Eksterrete

pri komputilaĵoj kaj retaj projektoj



Volumo 1 - eldono 2020

Temo: lerniloj kaj vortaroj

Kun vortareto de oftaj prikomputilaj vortoj en tri lingvoj

AŬTORO KAJ ELDONISTO
Yves Nevelsteen
yves@ikso.net

Flandra Esperanto-Ligo
Lange Beeldekensstraat 169
2060 Antwerpen
+32 3 234 34 00
www.esperanto.be

VOLUMOJ
Eksterrete estas plurvoluma verko. Jen la enhavo de la ĝisnunaj planitaj volumoj:

1 Lerniloj kaj vortaroj
2 Bitlibroj kaj bitgazetoj
3 Podkastoj kaj filmetoj
4 Blogoj kaj vlogoj

MALGARANTIO
Ĉi tiu verko ne celas esti kompleta. Ĝi nur reprezentas aktivajn kaj ĝisdatajn projektojn kiujn mi malkovris kaj taksas ne sufiĉe konataj kaj do diskonigindaj.

KONTRIBUU ANKAŬ VI
Ĉu laŭ vi mankas informoj en ĉi tiu volumo? Ĉu vi trovis eraron? Sciigu tion al mi. Per kunlaboro ni atingos pli.

Provlegita de Eddy Van den Bosch. Ĉiuj komentoj tre bonvenas.

Dato: 22 majo 2020

Ĉiuj rajtoj rezervitaj de Flandra Esperanto-Ligo



Eksterrete estas projekto oficiale subtenata de UEA.

Enkonduko

Dum prelegserio pri komputilaĵoj kaj retaj projektoj en lokaj kluboj en Benelukso mi rimarkis, ke tre mankas superrigardo de indaj (kaj aktivaj) projektoj. Mi renkontis plurajn esperantoparolantojn kiuj ne konis gravajn projektojn kiel Babadum kaj UEA Facila, ne scias kiel tajpi ĉapelitajn literojn per poŝtelefono, ne uzas bitlibrojn, ĉar tro komplikus... Post mia prezento mi foje per retpoŝto sendis la plej interesajn ligilojn al ĉeestintoj, sed tio klare ne sufiĉas. Papera verko kun tekstaj klarigoj daŭre plej taŭgas por tiu celo. Do, jen :-)

Por ke vi povu pli facile aliri la diversajn menciitajn ligilojn, la plimulton de la retejaj adresoj mi mallongigis per la servo *www.mallonge.net.* Ĝin kreis laŭ mia peto KuboF Hromoslav dum Somera Esperanto-Programado en Nitra (Slovakio).

Mi antaŭvidas ke kelkaj ligiloj kiuj estas menciitaj en ĉi tiu libreto, post jaro jam ne plu funkcios. Samkiel la reta mondo, ĉi tiu verko estas en konstanta evoluo. Estas grava praktika problemo, ke ĉio tro rapide ŝanĝiĝadas. Tial mi provas krei novan version ĉiujare. Ekzistas en majo 2020 du volumoj de Eksterrete; kromajn mi iom post iom aldonos. Ideoj ne mankas!

Per ĉi tiu verko mi ne nur celas informi esperantistojn, sed ankaŭ helpi diskonigi la mirindaĵojn kiujn kreas aktivuloj, plej ofte tute senpage. Mi esperas per Eksterrete instigi ilin daŭrigi la kreadon kaj ĝisdatigadon de lerniloj kaj vortaroj:

DANKON PRO VIA LABORO - BONAN DAŬRIGON

Ĝuu la esploradon!

Yves

LiberaPay


La fonduso Instigo-Liberapay, sub la aŭspicio de UEA, subtenas Esperanto-agadojn, kiuj celas provizi retajn servojn en Esperanto. Kiel komisiito de UEA pri reta agado, mi gvidas la laborojn.

Mi invitas vin subteni la kreadon, eldonadon kaj disvastigon de Eksterrete-libretoj per donaco al Instigo-Liberapay.

https://eo.liberapay.com/instigo

Lerniloj por komencantoj

Lernu.net *www.lernu.net/eo*



Lernu! (aŭ lernu.net) estas senpaga multlingva retejo por konatiĝo kun kaj lernado de la internacia lingvo Esperanto. En la paĝaro eblas informiĝi pri Esperanto, eklerni la lingvon per pluraj diversaj kursoj, uzi superrigardan gramatikon kun ekzercoj, fari ekzamenojn, ludi lingvoludojn, legi kaj aŭskulti rakontojn kaj uzi diversajn vortarojn.

Eblas ankaŭ partopreni virtualajn lecionojn, aŭskulti Esperanto-muzikon kaj eĉ spekti filmetojn en Esperanto. La retejo uzeblas en pli ol tridek lingvoj.

Duolingo *www.duolingo.com/courses* **MI REKOMENDAS**

Duolingo estas senpaga ludeca retejo kiu helpos vin evoluigi viajn lingvajn kapablojn. Ankaŭ ekzistas apoj por Android kaj Apple iOS, sed en ili mankas utilaj klarigoj kiujn vi en la reta versio jes ja legos.

Esploro pruvis, ke 34 horoj da Duolingo egalas al ses monatoj da lingva kurso je universitata nivelo. Ĉu vi estas komencanto, kiu volas lerni la fundamentojn aŭ vi volas praktiki vian legadon, skribadon kaj parolantan kapablojn, Duolingo estas science pruvita esti efika.

La Esperanta teamo oficiale kunlaboras kun la sekcio Lerniloj de la Akademio de Esperanto. Multaj frazoj en la kursoj estas voĉregistritaj.

La kurso *Esperanto por anglalingvanoj* aperis en majo 2015. En oktobro 2016 aperis kroma kurso *Esperanto por hispanlingvanoj*. La kurso *Esperanto por portugallingvanoj* realiĝis en la somero de 2018, kiam okazis la Universala Kongreso de Esperanto en Lisbono (Portugalio). En 2020 aldoniĝus ankaŭ franca kaj la ĉina versioj!



Duolingo Tiny Cards *www.mallonge.net/tinycards*

Tinycards estas la freŝa kaj amuza studa kunulo de Duolingo, kiu helpas vin studi kaj memori ion ajn. Tinycards estas havebla en retejo por Android kaj iOS.

Ekzistas pluraj memkreitaj lecionoj, grandparte angla-Esperanto, sed ne nur. Kaj... kreu viajn proprajn listojn!

Zagreba metodo: Learn Esperanto *https://learn.esperanto.com* **MI REKOMENDAS**

La Zagreba metodo estas maniero instrui Esperanton al lernantoj. Ĝi enhavas la 500 plej uzatajn morfemojn laŭ studoj de Zlatko Tišljar. En la Lernu-retejo la lernmaterialo estas proponita senpage: *www.mallonge.net/zagreba*

Georg Jähnig kreis surbaze de la Zagreba metodo apartan retejon. Ĝi estas ankaŭ havebla en malpli kutimaj lingvoj kiel la malaja, la turka kaj la ukraina.

Vortlisto de Kontakto *www.mallonge.net/kontakto-listo* **TRE UTILA POR KOMENCANTOJ**

Anna Löwenstein kreis vortliston de 1000 vortoj por kunlaborantoj de la revuo Kontakto, kiuj skribas en facilan Esperanton por komencantoj. Remuŝ kreis retpaĝon sur kiu ili aperas kun indiko ĉu temas pri transitivaj aŭ netransitivaj verboj. Aperas sur la paĝo la tagoj de la semajno, la monatoj kaj kelkaj gramatikaĵoj, kiel tabelvortoj, pronomoj, numeroj kaj afiksoj.

1. -a	**101.** celo	**201.** esperi	**301.** historio	401. kolo
2. aboni	**102.** cent	202. esplori	302. ho	**402.** kolekti
3. -aĉ	103. centro	203. esprimi	**303.** hodiaŭ	403. koleri
4. aĉeti	104. cerbo	204. esti	**304.** homo	**404.** koloro
5. -ad	**105.** certa	205. estimi	**305.** horo	405. kombi
6. adreso	106. cetera	**206.** -estr	306. horloĝo	**406.** komenci
7. aero	107. cigaredo	**207.** -et	307. hotelo	**407.** komerci
8. afabla	108. cirklo	208. eventuala	308. hundo	408. komforta
9. afero	**109.** ĉambro	209. evolui	**309.** -i	409. komisii
10. agi	110. ĉapelo	**210.** facila	**310.** ia	410. komitato

Gerda Malaperis *www.mallonge.net/gerda*

Gerda Malaperis estas originale esperantlingva romano verkita en 1983 de Claude Piron el Svislando. Eldonis ĝin Fonto, Brazilo. La libro estas la plej fama instrua rakonto en Esperanto. Ĝi estas plene da simplaj dialogoj el ĉiutage uzataj vortoj kaj taŭgas por plibonigi la konon de Esperanto ĉe lernantoj. La rakonto temas pri junaj amikoj kaj mistera forkapto de tradukistino. Aldone uzeblas vortolistoj en diversaj lingvoj.


Memrise *www.mallonge.net/memrise*

Memrise estas retejo, kiu ofertas interretajn kursojn kreitajn de siaj uzantoj. La plej granda parto estas formita de lingvokursoj, sed ekzistas kursoj ankaŭ pri aliaj temoj, kiel geografio kaj matematiko. La kursoj estas dividitaj en dek kategoriojn. Memrise uzas kombinaĵon de fulmokartoj kaj azenaj pontoj (nomataj Mems) por helpi la uzanton lerni rapide kaj efike. Ekzistas ankaŭ multaj Esperanto-kursoj.

Kurso de Esperanto *https://kurso.com.br*

Kurso de Esperanto estas senpaga kaj libera programaro por lerni Esperanton. Ĝi konsistas el 12 lecionoj. La kurso estas speciale dediĉita al komencantoj, kiuj scios la bazon de Esperanto ene de du semajnoj, pro optimuma e-lernado. Ĝin programis Carlos Alberto Alves Pereira, iama prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo.

La kurso estas bazita sur 10-hora kurso disvolvita de Esperanto-Societo Kebekia, kaj aliaj kursoj. Ĝi ekzistas jam en pli ol 23 lingvoj. Multaj volontuloj laboras por altigi la nombron da lingvoj.



Book2 kaj 50 Languages *www.mallonge.net/book2*

Lernu Esperanton rapide kaj facile per MP3-lingvaj kursoj de **Book2**. Esperanto kiel fremda lingvo inkluzivas 100 senpagajn facilajn lecionojn. Ĉiuj dialogoj kaj frazoj estas parolataj de denaskaj parolantoj. Ne necesas antaŭa scio pri gramatiko. Vi povas komenci lernadon tuj! Simple alklaku la frazojn por vidi la respondojn.

Ankaŭ ekzistas aplikaĵoj por Android kaj iOS. Temas pri la sama enhavo, sed nomiĝas 50 Languages.

Saluton - Esperanto aŭtodidakte *www.kursosaluton.org*

La metodo de la kurso Saluton! estas origine kreita de Audrey Childs-Mee antaŭ pli ol tridek jaroj. Ismael Ávila kreis retejon de la 192-paĝa libro. Ĝi precipe taŭgas por memlernado.

BaBaDum *www.babadum.com* **AMUZAS**

En 2016 lanĉiĝis la vortluda retejo BaBaDum. Vi povas per ĝi praktiki 1500 Esperantajn vortojn per bildoj. La voĉo estas de Natalia Żebrowska kaj helpis ŝin pri tradukado kaj provlegado teamo de volontuloj.

Lernanto skribis pri ĝi en forumo de Edukado.net la jenon:

"Mi jam provis ĝin kaj mi ŝatas ĝin, precipe ĉar ĝi nur montras bildojn. Mi opinias, ke tia metodo helpas al oni pli bone memori novajn vortojn. Ankaŭ, mi unue lernis Esperanton per Duolingo, kaj mi jam rimarkis, ke BaBaDum enhavas multe da vortoj kiuj ne aperis en la kurso ĉe Duolingo."



Pri la fundamento *www.mallonge.net/fundamento-lernu* **GRAVAS**

"Pri La Fundamento" estas kurso kies ĉefa celo estas konatigi vin kun la plej grava dokumento de la lingvo Esperanto, nome la Fundamento de Esperanto (Fundamento de Esperanto). Estas ĉiam risko ke lingvo, kiu estas uzata en ĉiuj mondopartoj, disiĝas en malsamajn dialektojn. Krome, ekzistas tiaj homoj, kiuj konstante volas fari ŝanĝojn en "planlingvo" kiel Esperanto. Tiaj ŝanĝproponoj riskas rezultigi senfinajn diskutojn aŭ eĉ malstabiligon de la lingvo.

Por eviti aperon de dialektoj, subitajn ŝanĝojn en la lingvo kaj kverelojn ĉirkaŭ ĝi, Zamenhof en 1905 prezentis la libron Fundamento de Esperanto. Tiu dokumento multe helpis kaj daŭre helpas al kreado de stabila kaj harmonia evoluo de "Lingvo Internacia". En la antaŭparolo de la verko, Zamenhof skribas: "... la «Fundamento de Esperanto» devas troviĝi en la manoj de ĉiu bona esperantisto kiel konstanta gvida dokumento ...". En la realo tamen ne estas tiel ke ĉiu esperantisto tralegis la Fundamenton, aŭ eĉ scias pri ties ekzisto! Sed, mi opinias ke estus tre bone se ĉiu, kiu serioze aliras Esperanton, scius pri la Fundamento kaj konus la plej gravajn partojn de ĝi. Pro tio, tiu ĉi kurso. **Respekton al vi kaj al la Fundamento**!

Apoj por komencantoj



Esperantokurso per rekta metodo
www.ei.nl/apo

Tre konata estas la Esperantokurso Esperanto per rekta metodo de Stano Marček. Kvankam la kurso mem nur estas en Esperanto, ĝi por diversaj naciaj komunumoj aperis kiel libro kaj kiel kompakta disko kun nacilingvaj klarigoj. Nun ĝi ankaŭ aperis kiel apoj.

Piet Buijnsters, la programisto, uzis por ĝi la tre trafajn kaj instruajn bildojn (desegnaĵojn) de Linda Marčekova el la kursolibro kaj kiam oni klakas aŭ tuŝas la tekstojn de la kurso oni ankaŭ tuj povas aŭdi la klaran prononcadon. En ĝi ankaŭ estas la ekzercoj kaj taskoj de la libro.

La apo rigore sekvas la taŭgan, metodan instrulinion de la kurso, sed kompreneble oni povas mem elekti sinsekvon kaj rapidon.



Eurotalk Utalk *www.mallonge.net/utalk2020*

Dum la 100-a Universala Kongreso de Esperanto en 2015, reprezentantoj de Eurotalk prezentis novan lingvolernan apon uTalk. Por ĉiu lingvo, la libera apo de Eurotalk inkludas dek kvin esencajn vortojn, kun pagitaj ĝisdatigoj por malŝlosi ĝis 1200 vortoj kaj frazoj kovrante 36 temojn. Ĝi ankaŭ havas la eblon lerni el 128 lingvoj, kio signifas ke la programo povas esti uzata preskaŭ de ĉiuj, kaj ne nur de anglalingvaj parolantoj.

La vortprovizo por uTalk estis tradukita al Esperanto de Katalin Kováts, Malcolm Jones kaj Petra Smideliusz, kaj registrita fare de Sylvain Lelarge kaj Katalin Kováts, en kunlaboro kun EuroTalk. uTalk uzas ludojn kaj agadojn por helpi uzantojn memori utilajn vortprovizojn, praktiki paroli la lingvon, kaj poste memori ĝin kiam ili bezonas ĝin.

50 Languages *www.50languages.com*

Lernu Esperanton! "Esperanto 50 lingvoj" (www.50languages.com) enhavas 100 lecionojn, kiuj provizas al vi bazan vortprovizon. Ĉi tiu senpaga aplikaĵo enhavas 30 lecionojn. Sen antaŭa scio, vi lernos flue paroli mallongajn frazojn en realaj mondaj situacioj en tre malmulte da tempo.

Ekzistas apoj por Android kaj iOS.

Language Drops *www.mallonge.net/drops*

En nur kvin minutoj ĉiutage vi lernos Esperanton per bele ilustritaj, enmiksiĝemaj kaj engaĝaj lecionoj. Vi fokusas pri la parto de Esperanto, kiu plej gravas - vortoj. Ĝi estas efika, amuza kaj senpaga (nur kvin minutojn tage).

Ekzistas apoj por Android kaj iOS.


Lingolia Daily *www.mallonge.net/daily-android* *kaj* *www.mallonge.net/daily-ios*

Lingolia Daily estas apo kiu ebligas al vi lerni vorton ĉiutage en sep lingvoj: la germana, angla, franca, hispana, itala, Esperanto kaj rusa.

La apo helpas vin facile memori la vortotrezoron danke al bildoj, ekzemplaj frazoj kaj aŭdiloj, kiuj stimulas la sencojn. Neniuj komputilaj voĉoj estas aŭdeblaj, nur tiuj de realaj homoj.

Vi povas praktiki vortprovizon kaj lerni ludeme per pluraj ludoj. Estas bildkartoj kaj kongruaj ludoj kaj ortografia defio por praktiki skribadon. Post instalado de la apo, vi havos aliron al 30 vortoj por ke vi povu tuj komenci.

Samtempa en-ap-aĉeto aktivigas la premian version, kiu donas al vi tujan aliron al ĉiuj vortotrezoroj. Estas pli ol 400 vortoj. Pagita versio ankaŭ permesas ludi ĉiujn ludojn kun aldonaj funkcioj kaj sen reklamo.



Lerniloj por komencintoj

Edukado.net *www.edukado.net* **MI REKOMENDAS AL INSTRUISTOJ**

Edukado.net estas retpaĝaro pri instruado de Esperanto. Ĝi celas ĉefe kunlaboradon inter Esperanto-instruistoj, sed estas ankaŭ helpilo por memlernantoj. La paĝaro estas prizorgata de Katalin Kováts kaj subtenata de Esperantic Studies Foundation.

Enhavo:

- Instrumaterialo (tekstoj, bildoj, sonmaterialo) por ĉianivelaj kursoj
- Katalogo kun detalaj recenzoj de Esperanto-lernolibroj
- Specimenoj de internaciaj kaj naciaj esperanto-ekzamenoj
- Anoncejo kaj legejo pri eventoj en Esperantio
- Listoj de Esperanto-lernejoj kaj kursgvidantoj
- Koresponda servo
- Forumo
- Reta Instruista Trejnado
- Reta ludo RISKO
- Ekparolu!

Ekparolu *www.edukado.net/ekparolu*

Lastatempe multaj homoj eklernas Esperanton per la reto, sed restas izolitaj de la Esperanto-komunumo kaj ne aktive ekuzas la lingvon. Per sia nova projekto Ekparolu, Katalin Kováts strebas ekparoligi ilin.

Spektu la filmeton pri Ekparolu en la retejo de la projekto por ekscii pli.

Risko *www.edukado.net/ludoj/risko*

Risko estas ludo de Edukado.net kiu celas klerigi la ludantojn pri kulturo, lingvo kaj movado de Esperanto. Krom la klerigado ili celas ankaŭ amuzi vin kaj per premio ĉiumonate kaj ankaŭ jare honori la plej bonajn ludintojn.

Por la ludo necesas ensaluti kaj aliĝi al la ludo. Ludi rajtas ĉiu membro de edukado.net. En la ludo estas starigitaj tri demandoj, po unu el la tri temgrupoj: lingvo, kulturo kaj movado. La demandoj estas ligitaj al Esperanto. Estas pluraj demandoj ankaŭ pri la paĝaro Edukado.net. La vicordon de la ricevotaj demandoj la ludanto mem povas elekti kaj per tio ellabori sian ludstrategion.



Komuna Eŭropa Referenckadro - memtaksilo *www.mallonge.net/ker*

La Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj (KER) estas gvidilo uzata por priskribi atingojn de lernantoj de fremdlingvoj ene de Eŭropo. En la kampo de fremdlingvoj la referenckadro difinas ses kategoriojn laŭ la nivelo de kompetento koncerne la fremdlingvon: A1, A2, B1, B2, C1, C2. Unuopaj kategorioj reflektas la nivelojn de komprenado dum aŭskultado kaj legado, de kapablo de parolado kaj konversacio kaj la kvaliton de la skriba prezento de la lernanto.

La referenckadro kiel tuto eldoniĝis oficiale nur en la lingvoj angla kaj franca. Ekde tiam jam aperis tradukoj en plurajn aliajn lingvojn, inkluzive de Esperanto, kiun pretigis Katalin Kováts kadre de Edukado.net. La tuta Esperanto-traduko kun komentoj aperis en 2007 en formo de libro, kaj papera kaj senpage elŝutebla. Tradukinto de la esperantlingva versio estis Roel Haveman, NL.

		A1 - Alpaŝo	A2 - Elano	B1 - Salto	B2 - Flugo
KOMPRENADO	Aŭda ricevado (aŭskultado)	Mi kapablas rekoni konatajn vortojn kaj tre bazajn vortogrupojn pri mi mem, pri mia familio kaj pri konkretaj aferoj en la proksima medio, kondiĉe ke oni malrapide kaj klare parolas.	Mi kapablas kompreni la plej ofte uzatajn vortojn kaj esprimojn, kiuj rilatas al mi (ekz. tre bazajn informojn pri mi, mia familio, butikumado, loka medio, laboro). Mi kapablas kapti la esencon en mallongaj, klaraj, simplaj mesaĝoj kaj anoncoj.	Mi kapablas kompreni la ĉefajojn en klara laŭnorma parolo pri ĉiutagajoj en laboro, studo, libera tempo k.s. Mi kapablas kompreni la esencon en multaj radio- aŭ televid-programoj pri aktualajoj aŭ pri temoj, kiuj apartenas al mia persona aŭ faka intereskampo, se oni parolas relative malrapide kaj klare.	Mi kapablas kompreni iom paroladojn kaj prelegojn, ka kompleksan argumentadon, temo estas sufiĉe konata. M kapablas kompreni plej mul televidprogramojn pri novaj aktualajoj. Mi kapablas kon plej multajn filmojn en laŭn lingvajo.
	Vida ricevado (Legado)	Mi kapablas kompreni konatajn nomojn, vortojn, tre simplajn frazojn, ekzemple en anoncoj, sur afiŝoj aŭ en katalogoj.	Mi kapablas legi tre mallongajn, simplajn tekstojn. Mi kapablas trovi atendeblajn, konkretajn informojn en ĉiutagaj tekstoj (ekz. en mallongaj anoncoj, flugfolioj, menuoj, horaroj) kaj mi komprenas mallongajn privatajn leterojn.	Mi kapablas kompreni tekstojn, skribitajn ĉefe en ĉiutaga lingvajo aŭ en faka lingvajo proksima al mia laboro. Mi kapablas kompreni la priskribon de okazajoj, sentoj kaj deziroj en privataj leteroj.	Mi kapablas legi artikolojn raportojn, kiuj okupiĝas pri nuntempaj problemoj, kaj e aŭtoro esprimas opinion aŭ vidpunkton. Mi kapablas ko nuntempan literaturan proz
PAROLO	Parola interagado	Mi kapablas komuniki, se la parolpartnero pretas ripeti sian diraĵon malpli rapide aŭ esprimi sin en alia maniero, aŭ helpas formi miajn frazojn. Mi kapablas starigi kaj prirespondi simplajn demandojn pri ĉiutagaj bezonoj aŭ tre konataj temoj.	Mi kapablas en simplaj, rutinaj situacioj simple kaj senpere interŝanĝi informojn pri la ĉiutagaj agoj kaj temoj. Mi kapablas efektivigi tre mallongan informinterŝanĝon eĉ tiam, kiam mi kutime ne sufiĉe komprenas por memstare subteni la konversacion.	Mi kapablas elturniĝi en la plimulto de la lingvaj situacioj, kiuj povas okazi dum vojaĝo en teritorio, kie la lingvo estas parolata. Mi kapablas senprepare partopreni en konversacio pri temoj konataj, ĉiutagaj aŭ apartenantaj al mia intereskampo (ekz. familio, libertempo, laboro, vojaĝo kaj aktualajoj).	Mi kapablas komuniki natu kaj senĝene. Mi kapablas al partopreni en diskutoj pri k temoj, kaj mi argumentante mian opinion.

En la retejo de Edukado.net vi povas elŝuti tabelojn pri komunaj referencniveloj: *www.mallonge.net/memtaksilo*

Paŝoj al plena posedo *www.mallonge.net/pasxoj*

Fama, progresiga legolibro de William Auld kun lingvaj ekzercoj. Enretigis ĝin Jerzy Wałaszek.

En la komenco la aŭtoro supozas ĉe la studanto posedon de la gramatiko kaj elementan vortprovizon de ĉ. 700 vortoj. En tiu ĉi libro estas klarigataj 1682 vortoj; kun la elementa vortaro, do, la studanto en la fino devus disponi pri ĉ. 2400 radikoj.

La libro celas kaj kursojn kaj memlernantojn. Kursgvidantoj scios utiligi la donitan ekzercmaterialon laŭ sia bontrovo. La devizo de la libro estas: *"Esperanton oni plej bone lernas per studado de bona Esperanto. Laŭeble evitu la nacian lingvon; komprenu en Esperanto, kaj vi pensos en Esperanto!"*

Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko *www.bertilow.com/pmeg* **MI REKOMENDAS**

La Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (PMEG) estas libro, kiu klarigas la Esperanto-gramatikon en facile komprenebla maniero. Ĝi estas verkita ĉefe de Bertilo Wennergren. Ĝi celas ordinarajn esperantistojn, kiuj volas studi la gramatikon, vortfaradon, skribon, kaj elparolon de tiu lingvo.

Por plifaciligi la komprenon, ĝi ne uzas tradiciajn gramatikajn terminojn. Ekzemploj de la uzataj terminoj estas O-vorto anstataŭ "substantivo" kaj "rolvorteto" anstataŭ "prepozicio". Tiuj novspecaj gramatikaj terminoj aldone pli taŭgas por priskribi Esperanton ol per la tradiciaj terminoj. Ekzemple, laŭ la tradiciaj terminaro, la vortoj "tiu", "ambaŭ" kaj "ties" estus adjektivoj, sed ili kondutas tre malsame al la adjektivoj finiĝantaj per "a"; la termino A-vorto kungrupigas vortojn, kiuj kondutas simile.


PMEG estas ĉefe praktika lernilo, do ĝi ne celas esti teoria verko por lingvistoj, male de la Plena Analiza Gramatiko, kiun oni taksis la plej granda esplora projekto pri Esperanta gramatiko ĝis la eldono de PMEG. De 1995 ĝis 2006, PMEG estis nur proponite senpage en interreto, sed ekde 2006 ankaŭ aĉeteblas papera versio, eldonita de Esperanto-USA.

La tuta Esperanto *www.mallonge.net/tuta-eo*

La Tuta Esperanto estas kurslibro verkita de Henrik Seppik kaj eldonita de la Urba komitato de Bulgara Esperanto-Asocio en la jaro 1971 en Sofio. La libro konstituas ankaŭ gramatikon por progresintoj kaj estas samtempe gvidilo por kursestroj. La tria eldono aperis en 1984 ĉe la Hungara Esperanto-Asocio en Budapeŝto kaj havas 184 paĝojn. Kvankam la verko ne estas nova, ĝia enhavo estas tre bonkvalita. En la Lernu-retejo la lernmaterialo estas proponita senpage.

Libroj de Claude Piron *www.mallonge.net/gerda kaj www.mallonge.net/piron-aliaj*

La verkaro de Claude Piron inkluzivas lernolibrojn, facilajn legaĵojn, romanojn, novelojn, poezion, faktolibrojn kaj artikolojn. Liaj plej famaj verkoj estas **Gerda Malaperis** kaj La Bona Lingvo. Ĉar Claude Piron apenaŭ uzas neologismojn en siaj libroj, komencintoj kutime sufiĉe bone komprenas la verkojn.



Vi komencis lerni Esperanton. Kaj nun vi volas iri plu antaŭen. Vi deziras plibonigi (pli-bon-igi) vian scion de la lingvo. Tiam la libro **Vere aŭ fantazie** estas por vi. Por povi uzi la lingvon pli bone, kaj por ĝin pli bone kompreni, vi bezonas lerni novajn vortojn. La libro povos servi al vi tiucele: ĝi iom post iom venigos vin al la kompreno de la mil vortoj aŭ vorto-partoj, kiujn oni plej multe uzas en Esperanto, kaj per kiuj oni povas fari multajn milojn da aliaj vortoj, kiuj, fakte, ebligas paroli kaj skribi pri ĉio.

Readlang *www.readlang.com/eo/library*

Legu plurajn verkojn en ĉi tiu retejo en Esperanto kaj alklaku vortojn por ricevi tradukon. Pluraj lingvoj estas disponeblaj. Ĝi por Esperanto ankoraŭ estas en la beta-versio. Vortoj en Esperanto ankoraŭ ne estas bazitaj sur ofteco kaj tekstoj ne estas gradigitaj laŭ malfacileco. Readlang uzas Google Translate por la tradukoj.

Uzu la kromprogramon por la retumilo Chrome por legi artikolojn de ĉiu ajn retejo: *www.readlang.com/webReader*

Lernmaterialoj de Lernu *www.mallonge.net/lernmaterialoj*

En la retejo de Lernu.net interalie estas haveblaj jenaj lernmaterialoj: Ana Pana, Ana renkontas, Kio okazas?, Jen nia IJK, Vojaĝu kun Zam, Pri La Fundamento

UEA Facila *https://uea.facila.org* **MI REKOMENDAS**

uea.facila FACILAJ ARTIKOLOJ EN ESPERANTO

En ĉi tiu retejo aperas informoj kaj novaĵoj pri UEA kaj la Esperanto-movado. La artikoloj estas mallongaj kaj facilaj por helpi homojn, kiuj nun lernas la lingvon, kaj ili enhavas nur la radikojn troveblajn en la listo de facilaj vortoj *www.mallonge.net/kontakto-listo*.

Se en iu artikolo aperas vorto, kiu ne troviĝas en tiu listo, eblas facile trovi ĝian difinon. Krome, estas ankaŭ disponeblaj **sondosieroj de la artikoloj**. Estas bonega maniero por ekzerciĝi!

De verkantoj kiuj ŝatus kontribui al uea.facila, oni petas uzi nur la radikojn en la vortlisto *https://uea.facila.org/vortlisto*. Eblas elŝuti preseblajn versiojn 2-paĝan kaj 3-paĝan por elpresado.

Cetera lernmaterialo: malkovru en Vikipedio *www.mallonge.net/lerniloj*

Lu Wunsch-Rolshoven kreis kaj regule ĝisdatigas en Vikipedio liston de pli ol 50 enretaj ofertoj por la lernado de Esperanto: lingvokursoj, vortaroj, tradukiloj, gramatika kontrolo, lingvoludoj, vortkartaroj ktp.

Lerniloj por aliaj lingvoj en Esperanto

Deutsch.info *www.deutsch.info/eo*

Deutsch.info estas retpaĝaro por lerni la germanan lingvon, uzanta modernajn didaktikajn ilojn kaj disponiganta ankaŭ utilajn informojn pri vivo kaj laboro en Germanio kaj Aŭstrio.

Russky.info *www.russky.info/eo*

Senpaga multlingva retejo, kiu kombinas lernadon de la rusa kun praktikaj konsiloj pri vivo kaj laboro en Rusio.

Slovake.eu *www.slovake.eu/eo*

Multlingva retejo por instrui la slovakan lingvon al eksterlandanoj. La projekto estis subtenita de la EU-agentejo EACEA kaj ekfunkciis en marto 2011.

La retejo enhavas diversnivelajn lingvajn kursojn (A1, A2, B1 kaj B2) kun multaj ekzercoj, testoj, vortaroj – ĉion por ke vi povu konatiĝi kun la gramatiko, lerni novajn vortojn kaj eĉ praktike komuniki en tiu ĉi lingvo kun aliaj uzantoj de la paĝaro. Aldone vi povas ĉi tie trovi diversajn informojn pri Slovakio - mezeŭropa lando kun interesa historio, belega naturo kaj multaj turismaj lokoj.



Vortaroj difinaj kaj plurlingvaj

Akademia Vortaro *www.mallonge.net/akademia*

La Akademia Vortaro (AV) esence estas la Universala Vortaro de la Lingvo Internacia Esperanto (UV). AV konsistas el la UV de la Fundamento de Esperanto plus ĉiuj aldonoj kaj korektoj de UV, kiujn plenumis la Lingva Komitato kaj la Akademio de Esperanto.

La aparta nomo "Akademia Vortaro" estas uzata por eviti konfuzon kun tiu versio de la Universala Vortaro, kiu estas parto de la netuŝebla Fundamento. AV do estas ĝisdatigita kaj kompletigita versio de la Universala Vortaro.

Baza Radikaro Oficiala (BRO) estas verko publikigita de la Akademio de Esperanto. Ĝi ordigas la bazajn radikojn de Esperanto laŭ ofteco (aŭ, pli precize, laŭ la ofteco de apero en ofteco-listoj). Ĝi rezultas el komparo de diversaj pli fruaj ofteco-listoj starigitaj laŭ tre malsamaj kriterioj. Laŭ ilia ofteco en tiuj listoj la radikoj estas ordigitaj en naŭ grupoj, tiel ke en la unua troviĝas radikoj, kiuj aperas en la plej multaj el tiuj ofteco-listoj, en la dua troviĝas la radikoj, kiuj aperas due plej multe ktp ĝis la naŭa, kie troviĝas la radikoj, kiuj aperas en la plej malmultaj ofteclistoj. Ĝi estas parto de la Aktoj de la Akademio II 1968-1974. BRO estas nun priserĉebla parto de la rete alirebla Akademia Vortaro (AV).

Apertium *www.mallonge.net/apertium*

Apertium estas libera / malfermkoda maŝintraduka platformo, origine desegnita por paroj de proksimaj lingvoj, kaj poste etendita al pli malproksimaj paroj de lingvoj kiel ekzemple la angla-kataluna paro. La platformo provizas:

- aŭtomatan tradukilon, kiu ne dependas de iu ajn lingvo
- lingvajn ilojn por administri la necesajn datumojn por realigo de aŭtomata traduka sistemo por donita lingva paro
- lingvajn datumojn por kreskanta nombro da lingvaj paroj.

Bazaj radikoj Esperanto-Esperanto *www.mallonge.net/bazaj*

Ĉefe la 2500 vortoj el la Baza Radikaro Oficiala (*vidu: Akademia Vortaro*) kun kelkaj 200 aliaj vortoj klarigitaj en facila Esperanto. Lastfoje aktualigita en 2006, kiam la kreinto Wouter Pilger mortis. Ĉar la retejo ne plu ekzistas, mi disponigas kopion en la Komputeko-retejo.

La Bona Lingvo *www.bonalingvo.net*

Jen provo redoni iom malsimplajn vortojn en Esperanto per pli simplaj. Esperanto estas lingvo kun krea povo, do uzu ĝin kree! Esprimu vin nuance, komprenige, ne per sensukaj piednotendaj vortaĵoj. Gustumu ĉi tie la potencon de la simplaj vortoj anstataŭ la proponojn de komplikantoj. La malkonsilataj vortoj jen estas naturisme okcidentaj jen grekdevenaj nekompreneblaĵoj. La fonto de ĉi tiuj vortoj estas pluraj.

Etimologia vortaro (EDEL) *www.mallonge.net/edel*

Etimologia vortaro de Andras Rajki kiu aperis en 2006 en Budapeŝto. Ĝi klarigas pri la origino de multaj vortoj en Esperanto. Laŭ la retejo ĝi estas precipe bazita je la *Konciza etimologia vortaro* de A. Cherpillod el 2003 kaj la *Etimologia Vortaro de Esperanto* de E. Vilborg. Mi hazarde trovis EDIL-on en la interreta arkivejo *Wayback Machine* kaj volonte disponigas kopion en la Komputeko-retejo.

abono = Rus. абонемент, Lit. abonementas, Pol. abonament, Ger. Abonnement, Fre. abonnement, Ita. abbonamento
aborto = Rus. аборт, Lit. abortas, Ger. Abort, Ita. aborto, Eng. abortion, Lat. abortus
abrikoto = Fre. abricot, Eng. apricot
absceso = Fre. abscès, Eng. abscess
absoluta = Rus. абсолютный, Lit. absoliutus, Pol. absolutny, Ger. absolut, Eng. absolute
absolvi = Ger. absolvieren, Eng. absolve, Lat. absolvere
absorbi = Ger. absorbieren, Fre. absorber, Eng. absorb, Lat. absorbere
abstini = Fre. abstenir, Eng. abstain, Lat. abstinere
abstrakta = Rus. абстрактный, Lit. abstraktus, Ger. abstrakt, Eng. abstract, Lat. abstractus
absurda = Rus. абсурдный, Lit. absurdiškas, Ger. absurd, Fre. absurde, Eng. absurd, Lat. absurdus

Glosbe *www.glosbe.com/eo* **MI REKOMENDAS**

Glosbe estas lanĉita en aŭgusto 2011. Ĝi provizas senpagajn vortarojn por preskaŭ ĉiu ekzistanta lingvo kaj tradukmemoro kun 1 013 284 995 da frazoj. Ĝi precipe ĉerpas informojn el ekzemple Reta Vortaro, Google Translate, Apertium kaj Vikivortaro (Wiktionary) kaj montras ekzemplajn frazojn de Tatoeba kaj eĉ KDE (Linuksa fenestrilo). Tio ne estas detalo. En Tatoeba troviĝas pli ol 550 000 frazoj en Esperanto! Ekde novembro 2017 Glosbe enhavas ankaŭ vortojn el la komputila terminaro Komputeko. Per la apoj eblas elŝuti vortarojn por ilin poste uzi eksterrete. Elŝuti la apojn: *www.mallonge.net/glosbe-apo* (Android) *www.mallonge.net/glosbe-apo2* (Apple iOS)




Google Translate *https://translate.google.com*



Google Translate estas tre konata, senpaga reta maŝintradukilo kreita de la retenterpreno Google. Ĝi kapablas traduki vortojn, frazojn kaj retpaĝojn al pli ol kvindek lingvoj, inkluzive de Esperanton (ekde februaro 2012).

La tradukilo gajnis internacian konkurson pri ila tradukado nelonge post sia komenco je la printempo de 2006. Tamen ĝi ankoraŭ havas limigojn. Ĝiaj algoritmoj bazatas sur statistika analizo; do ĝi ne tradukas laŭ gramatikaj reguloj. Tial tradukita teksto povas havi sensencaĵon aŭ evidentajn erarojn. Foje la ilo eĉ maligas la signifon de frazoj, precipe en lingvoj havantaj deklinaciojn.



En septembro 2017, Google multe plibonigis Google Translate per "neŭra maŝintradukado" por 96 lingvoj, inkluzive de Esperanto. Neŭra maŝintradukado uzas kompleksan procesadon por simuli kiel homo lernas lingvon. Pliboniĝoj estas plej rimarkindaj en tutaj frazoj kaj pli longaj tekstoj. Vi povas mem kontribui al Google Translate tradukante kaj aprobante frazojn: *www.mallonge.net/guglo-kontribui*

Ilustrita oficiala radikaro esperanta *www.mallonge.net/bazaradikaro*

Poŝformata, ilustrita eldono de la Baza Radikaro Oficiala, aprobita de la Akademio. La praktika libreto enhavas simplajn, eĉ je baza nivelo kompreneblajn difinojn de la ĉ. 500 listigitaj vortoj, kaj tial povas esti utila helpilo por la lernantoj de la lingvo.

Lernu tradukvortaro *www.lernu.net/vortaro*

Krom multajn kursojn por diversaj niveloj kaj aĝoj, Lernu! havas ankaŭ plurajn aliajn servojn kaj ilojn. Multlingva vortaro estas unu el tiuj servoj.

Majstro tradukvortaro *www.majstro.com*

Majstro estas Esperanta multlingva tradukvortaro kreita de la nederlandano Gerard van Wilgen. Ĝi donas eblon serĉi tradukojn de vortoj en 50 lingvoj, simile al la projekto Ergane. Estas ankaŭ unika eblo elekti unikodan virtualan klavaron por enskribi vortojn laŭ la latina, la cirila aŭ la greka alfabetoj.


Proverbaro *www.proverbaro.net* **MI REKOMENDAS**

Proverboj estas la ornamaĵo de la parolo. Rob Keetlaer kreis unuecan rete konsulteblan kolekton kiu interalie baziĝas sur la verkoj *Proverbaro Esperanta* de L.L. Zamenhof kaj *Een verzameling Esperanto Spreekwoorden en Zegswijzen* de M. de Waard.

Reta Vortaro (ReVo) *www.reta-vortaro.de*

ReVo estas ĝenerala Esperanta vortaro en interreto. Ĝi havas kaj esperantlingvajn difinojn de la kapvortoj, kaj **nacilingvajn tradukojn**, krome aldonajn informojn kiel ekzemplajn frazojn, bildojn. Krom la lingvaj indeksoj ĝi havas ankaŭ fakajn indeksojn kaj tezaŭron. Je 2019-03-29:

- Kapvortoj: artikoloj: 11 752, derivaĵoj: 27 968, sencoj: 34 627
- Tradukoj: francaj: 40830, germanaj: 33 688, rusaj: 32 718...
- Fakvortoj: matematiko: 1289, zoologio: 1104, botaniko: 1021...



PreVo *www.mallonge.net/prevo-android* & *www.mallonge.net/prevo-ios* **MI REKOMENDAS**

PreVo - portebla versio de la Reta Vortaro estas elŝutebla en Google Play. Ĝi ne bezonas konekton al la interreto, estas rapide serĉebla kaj inkluzivas tradukojn al multaj lingvoj. Robin Hill kreis iOS-version.

Simpla Vortaro *www.simplavortaro.org* **MI REKOMENDAS**

La Simpla Vortaro estas interfaco por la difinoj de ReVo. Ĝi inkluzivas kelkajn helpilojn kaj simplan strukturon. Oni povas uzi aŭ supersignojn aŭ la x-sistemon aŭ la h-sistemon (ekzemple: aŭ «ĵaŭdo» aŭ «jxauxdo» aŭ «jhaudo»). Ankaŭ La Simpla Vortaro komprenas la -j kaj -n finaĵojn. Por i-vortoj, oni povas serĉi ilin en iu ajn modo. Krome, ĝi enhavas malprecizan serĉilon. Se oni iomete eraras pri la literumado, La Simpla Vortaro plejofte trovas la deziratan vorton.

Fine, estas vort-far-ad-il-o. Oni povas serĉi vortfaradaĵojn kaj La Simpla Vortaro provas diveni la derivadon. Ĉi tio iufoje inkluzivas sensencajn derivadojn, sed ĝi provas diveni la plej verŝajnan eblecon.

Sensagent *www.mallonge.net/sensagent*

En la retejo de la franca ĵurnalo Le Parisien mi trovis la praktikan ilon SensAgent. Temas pri enciklopedio, tezaŭro, difinvortaro kaj tradukvortaro. Por la difinoj ĝi referencas precipe al Vikipedio.

Tabuaj vortoj en Esperanto *www.mallonge.net/tabuaj*

Nek Zamenhof nek la aliaj pioniroj de lingvo internacia en siaj verkoj uzis obscenajn vortojn, kvankam ĉiuj ili klopodis fari el Esperanto realan lingvon. Unue la tabuaj vortoj publike aperis en "Sekretaj Sonetoj" de Peter Peneter en 1931. Post kvardekkvinjara ekzistado Esperanto fariĝis plenrajta lingvo samkiel la naciaj. Sed la vortaroj, kie i.a. estas tabuaj vortoj, ne multenombras. Ankoraŭ la esperantistaro hontas...

Ĝis nun la plej seriozan kontribuon por la sistemigo de la obscenaj vortoj kaj esprimoj faris Renato Corsetti per "Knedu min, sinjorino" kaj "Propono por kromvortaro". Tiu ĉi vortaro el 1991 daŭrigas la esploradon kaj pliriĉigas la tabuajn vortojn en Esperanto. La ekzemploj pruvas, ke la lingvo povas esprimi ĉion, eĉ la plej intiman.

Aŭtoroj: Hektor Alos, Kiril Velkov. Redaktoro: Ljubomir Trifonĉovski.

Tatoeba *www.tatoeba.org/epo* **MI REKOMENDAS**

Tatoeba, kies nomo devenas de la japana kaj signifas "ekzemple", estas kunlabora projekto celanta kolekti multajn frazojn tradukitajn en diversajn lingvojn. Tatoeba konsistas el granda datumaro de ekzemplaj frazoj tradukitaj en diversajn lingvojn kaj funkcias kiel speco de multlingva traduka vortaro, en kiu se oni serĉas tradukon por vorto, oni trovas ekzemplajn frazojn, en kiuj la serĉita vorto estas uzata.

En novembro 2019 aperis en Tatoeba **606 865 frazoj en Esperanto**. Ĝi tiam estis la kvina lingvo laŭ kvanto de frazoj.

Tuja vortaro *www.tujavortaro.net*

Ĝi estas sendube la plej tuja vortaro enrete, kaj permesas vin ekkoni novajn esprimojn rapide kaj efike. La Tuja Vortaro baziĝas sur libera enhavo (ESPDIC, eldonita sub GPLv2), kaj ĝi mem estas libera programo kun la fontkodo disponebla ĉe GitHub. Malgraŭ tiu boneco, ĝi povus pliboniĝi. La vortaro ne multe ampleksas, kaj estus bone havi aliajn fontojn serĉeblaj. Krome, ĝi ankoraŭ ne funkciigis HTTPS, tre grava ilo por sekureco kaj privateco nuntempe.

Vikivortaro *https://eo.wiktionary.org*

Vikivortaro estas la esperantlingva Wiktionary: kunlabora projekto por krei libere haveblan vortaron kaj vortprovizaron de ĉiuj lingvoj. Alivorte, Vikivortaro konsistigas eblecon starigi iom post iom LA plej grandan vortaron en Esperanto iam ajn.

En novembro 2019 troviĝis en Vikivortaro 100 805 Esperant-lingvaj kapvortoj por pli ol 198 lingvoj.



Vikipedio *https://eo.wikipedia.org*



Kelkaj esperantistoj uzas Vikipedion kiel tradukvortaron. Ili faras tion tiel ĉi:

1. serĉi la vorton en nacia lingvo (ofte la angla)
2. kontroli maldekstre malsupre ĉe la aliaj lingvoj ĉu estas havebla versio de la artikolo en Esperanto
3. se jes, alklaki ĝin :-)

Atentu: iu ajn povas redakti Vikipedion. Povas esti bona inspirilo aŭ referenco, sed ne estas ideala fonto de fidindaj tradukoj.

Uzi Vikipedion kiel difinvortaron evidente ankaŭ eblas.

Vikia Vortaro ViVo *www.kono.be/vivo* **MI REKOMENDAS**

La Vivo-vortaro de Bart Demeyere havas 2 funkciojn:

1. ViVo-serĉilo en diversaj retaj vortaroj: ReVo, Vikipedio, Majstro, Komputeko, Lernu, Wiktionary, Glosbe, LangSoft, EoRu.ru, WordReference, Encyclo-EN, Merriam-Webster, Encyclo-NL, Enzyklo-DE, Bildvortaro de Esperanto (libro), kaj la propra BiVo (BildVortaro).
2. ViVo-vikio. Diskutejo, antaŭpreparejo por aliaj vortaroj kaj terminaroj kiel ReVo, Vikivortaro ktp. La enhavo estas tute libera, ĉiu rajtas fari ion ajn per la enhavo eĉ sen mencii la fonton, sed la enhavo devas ĉiam resti tute libera kaj neniu rajtas forpreni ĝin. Neniu redaktanto rajtas postuli iun rajton kaj aliflanke neniu rajtas forpreni la liberecon de ViVo.

Vortlisto de Kontakto *www.mallonge.net/kontakto-listo*

Anna Löwenstein kreis vortoliston por la kunlaborantoj al la revuo Kontakto, kiuj skribas en facilan Esperanton por komencantoj. Temas pri la 1000 plej oftaj vortoj. En la retejo de Raymond Alexis Pierre GERARD, en Esperantujo konata kiel Remuŝ', vi trovos tiun liston kun indiko ĉu verboj estas transitivaj aŭ ne. Por verki facilan tekston laŭ la reguloj kaj vortolisto de Kontakto, uzu tiun ĉi "facililon": *www.mallonge.net/facililo*

Vortaro.net *www.vortaro.net* **MI REKOMENDAS**

Vortaro.net estas la reta versio de unu el la plej famaj E-verkoj de lastaj jardekoj "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" (PIV). Jam multajn jarojn PIV estas la plej ampleksa **difin-vortaro** en Esperanto, kiu unuan fojon aperis en la jaro 1970. Ekde aprilo 2012 PIV estas uzebla ankaŭ en la reto. En la reta versio ne estas bildoj.

Fakaj vortaroj kaj terminaroj

Bicikla vortareto *https://bemi.free.fr/biciklo*

20-lingva vortaro pri biciklo-partoj kaj muntopecoj.

Bildvortaroj

Nigra-blanka vortaro de Sylla Chaves aperis en 1991 *www.mallonge.net/chaves*

En 2012 aperis ĉe la Flandra Esperanto-Ligo 'Bildvortaro en Esperanto', 800-paĝa verkego kun pli ol 30 000 terminoj cititaj kaj bildigitaj. La eldono estas daŭrigo kaj vastigo de Esperanta Bildvortaro de Rudiger Eichholz, kiu estis fidela traduko de la dua eldono de la fama bildvortaro de la germana eldonejo Duden. La nova versio estas traduko de la sesa eldono de la vortaro de Duden, kaj pro tio estas multe pli nuntempa. Tial do nur 25% de la nunaj terminoj jam aperis en la adapto de Eichholz; 75% estis aldonitaj de la prizorgantoj de la nova versio, la konataj vortaristoj Petro Desmet' kaj Jozefo Horvath.

Ekzistas indekso de la bildvortaro. Tre praktikas la eblo traserĉi tiun ĉi indekson pere de la ViVo-vortaro! *www.kono.be/vivo*

Ekologia terminaro *www.mallonge.net/ekologia*

Ekologia terminaro alfabetigita kaj kun difinoj en esperanto ekvivalentoj en la rusa, angla, franca kaj itala lingvoj.

Eŭroĵargono ĉe EU-instancoj *www.mallonge.net/eu*

Eŭropuniaj oficistoj kaj ĵurnalistoj kiuj raportas pri EU-aferoj ofte uzas ĵargonajn vortojn aŭ esprimojn nur kompreneblaj al ili mem. Eŭroĵargono povas esti enigma por la ĝenerala publiko, kaj pro tio oni skribis glosareton. Raymond Gerard (Remuŝ) tradukis ĝin al Esperanto.

Fotografia terminaro *www.mallonge.net/fotografia*

En 2017 Lode Van de Velde kompilis fotografian terminaron. Ĝi enhavas pli ol 400 terminojn pri cifereca kaj analoga fotografio, inkluzive terminojn por la plej novaj inventaĵoj.

Internacia Kongresa Universitato: IKU-libro *www.mallonge.net/iku*

La Internacia Kongresa Universitato (IKU) estas serio de fakaj prelegoj, kiuj estas ĉiujare prezentataj dum la Universala Kongreso de Esperanto. Ĝi okazas seninterrompe de 1951, tiam sub la nomo Internacia Somera Universitato (ISU). La nomo estis ŝanĝita en 1981, okaze de la 66-a UK 1981 en Braziljo, kiu okazis en vintro (sud-hemisfera). Ekde 1997 la IKU-prelegoj aperas broŝurforme dum la UK. PDF-versio de multaj IKU-libroj estas elŝuteblaj. Ĉar la libron oni vendas dum UK kaj poste en la libroservo de UEA, oni sisteme atendas du jarojn por disponigi senpagan PDF-version.


Komputeko *www.komputeko.net* **MI REKOMENDAS**

Komputeko estas reta projekto de E@I, kiu celas kunigi la prikomputilajn terminojn de diversaj vortaroj. En la retejo komputeko.net vi trovos pli ol 10 000 tradukojn de prikomputilaj terminoj usonanglaj al Esperanto (10061). Ankaŭ ekzistas 2 libretoj kiujn vi povas libere elŝuti de la retejo kiel PDF-dosiero: *www.komputeko.net/libro.php*

Aperas en la retejo lingvaj konsideroj por tradukistoj kaj verkistoj de komputilaj programoj, unikoda konvertilo, informoj pri diversaj utilaĵoj ktp.

Konstruado-kajero de TAKE *www.mallonge.net/take*

TAKE celas arigon de ĉiuj Esperanto-parolantoj, fakuloj pri konstruado (ekde la elpensado ĝis la interna kaj ekstera aranĝado) por profesiaj interŝanĝoj kaj terminologia laboro. Ĝi eldonas ĉiu-jare teknikan broŝuron "Jarkolekto de TAKE" kaj ekde 2016 "Konstruado-kajero de TAKE". Jarkolektoj estas elŝuteblaj (PDF) de la retejo de TAKE.



Manĝeblaj sovaĝaj plantoj *www.eldonejolibera.be*

Tiu ĉi plenkolore ilustrita libreto prezentas 20 oftajn manĝeblajn, sovaĝajn plantojn, kun la nomo en Esperanto kaj la latina, franca, germana kaj nederlanda lingvoj.

Popularmuzika Terminaro en Esperanto *www.bertilow.com/roko*

Tiu ĉi terminaro kreita de Bertilo Wennergren en 1999 enhavas ĉefe vortojn pri la popularmuzikaj stiloj roko kaj popo, sed ankaŭ ĵazo, Latin-Amerika muziko kaj folklora muziko estas traktataj, kaj eĉ arta ("klasika") muziko estas tuŝata. Ian kompletecon oni tamen atendu nur pri roko kaj popo.

Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko *www.eventoj.hu/steb*

La *Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko* (STEB) estas funkciigata de la Esperanto-Centro "Eventoj" en Budapeŝto (Szilvási László, Mészáros István, Horváth Kata, k.a), kiuj skanis aŭ retajpis plurcentojn da malnovaj, ne plu haveblaj libroj, revuoj kaj artikoloj.

Ĉu vi serĉas malnovajn fotografian fakvortaron, terminaron de fiziko aŭ maristan terminaron? Vi verŝajne trovos ĝin en STEB.

Vortaroj kaj kursoj por parolantoj de la angla

DICT.CC *www.mallonge.net/dict*

Angla-esperanta vortaro al kiu vi povas ankaŭ mem kontribui.

ESPDIC *www.mallonge.net/espdic*

ESPDIC estas iom fama vortaro angla-Esperanto-angla kreita de Paul Denisowski. Ĝi enhavas 63 478 vortojn. Ĉar ESPDIC estis desegnita por faciligi al iu ajn uzi la vortaron en siajn proprajn projektojn, ekzistas pluraj retejoj kaj apoj kiuj uzas ĝiajn datumojn.

Retaj vortaroj kiuj uzas ESPDIC: *https://retvortaro.appspot.com* kaj *www.dictionaryq.com/esperanto* Senpagaj aplikaĵoj: *www.mallonge.net/espdic-apo* (Android) *www.mallonge.net/espdic-apo2* (iOS)

Lingolia *https://speranto.lingolia.com/en kaj www.mallonge.net/lingolia-apo (iOS)*

Ĉi tiu referenca libro por Esperanto klarigas gramatikon kaj vortfaradon en komprenebla maniero. Ĝi taŭgas por komencantoj kaj progresantoj. La gramatikaj reguloj estas klare strukturitaj kaj havas ilustritajn ekzemplojn, kiuj helpas videbligi la regulojn. Kun interagaj ekzercoj por testi vian scion.

Plej oftaj vortoj Esperanto - angla *www.mallonge.net/oftaj-angla*

Esperanto-English Glossary de Yves Bellefeuille kun la 552 plej oftaj Esperantaj vortoj.

Vorto de la tago: Esperanto word of the day *www.mallonge.net/tagvorto*

Iam la retejo Lernu.net proponis *Vorton de la tago*, sed kun la lanĉo de la nova retejo en 2016 tiu ĉi servo malaperis. Alternativo estas la apo Esperanto word of the day. Tiu ĉi apo por Android proponas ĉiutage alian vorton kun klarigo kaj prononco en Esperanto kaj kun traduko al la angla.

Vortaro por parolantoj de la ĉeĥa

PAKEO *www.mallonge.net/pakeo-cs*

"Esperanton vi havas en la poŝo" – poŝformata lernolibreto kun ekzercoj kaj vortareto.

Esperanta-ĉeĥa vortaro *www.slovnik.cz*

La granda ambaŭflanka vortaro de Josef Hron troveblas en www.slovnik.cz (necesas elekti la lingvon, tie troviĝas ankaŭ aliaj lingvoversioj), en www.zmsoft.cz/eo-slovnik-hron (tamen en la ĉeĥlingva interfaco) aŭ en Excel *www.esperanto.wz.cz* (en dekstre kolumno: Stažení slovníku - alklaki Verze 11 MS Wordú). Ĝi estas mirinda per amplekso, tamen ĝi estas pli kolekto de trovitaj vortvariantoj.

Kurso por parolantoj de la ĉina

Konciza Fundamenta Kurso de Esperanto *www.mallonge.net/konciza*

Verkis Liu Xiaozhe (Solis).

Vortaro por parolantoj de la dana

Dansk Esperanto Ordbog *www.vortaro.dk*

La lasta dana-Esperanta vortaro aperis en la jaro 1949, kaj ĝi uzis la antaŭmilitan, nereformitan ortografion de la dana lingvo. Post tiam la vortaro neniam estis represita. Danaj esperantistoj starigis al si la celon fine ellabori novan, modernan vortareton. Dum la laboro la ambicio kreskis, kaj anstataŭ konciza vortolisto en 2010 fine aperis vera vortaro. La nova libro estis presita en nur cent ekzempleroj, ĉar novajn eblas facile produkti laŭbezone. La sama datumbazo estas uzata ankaŭ en libere alirebla reta vortoserĉilo, kaj krome estas ellaborata poŝtelefona versio. Redaktita de Preben Bagger. Redakcio: Jacob Nordfalk, Peter Weide kaj Jytte Sunekær.

Vortaroj kaj kursoj por parolantoj de la franca

L'espéranto, c'est dans la poche *www.mallonge.net/danslapoche*

Ĉi tiu 24-paĝa kolora broŝuro estas destinita al ĉiuj, kiuj deziras lerni Esperanton. En 8 lecionoj kun korektitaj ekzercoj, vi lernos la bazojn de Esperanto kaj rapide povos komuniki kun Esperanto-parolantoj el la tuta mondo. Ĉi tiu broŝuro estas reeldono de PackEo, kiun kreis Henrri-Sebastien Erhard. La ilustraĵojn desegnis Anna Striganova.

iKurso de Espéranto France *https://ikurso.esperanto-france.org*

Superrigardo de haveblaj retaj kursoj. Ĝi interalie enhavas franclingvan kurson por komencantoj en 10 lecionoj, kun aŭ sen helpo de korektanto.



Fakvortaroj Esperanto-franca *www.mallonge.net/bertin-fak*

Listo de Esperantaj-francaj fakvortaroj de Christian Bertin pri:
- Agrikulturo, abelbredado, arbokultivo, bredado, hortikulturo, forstokultivo
- Anatomio
- Medicino, farmacio, psikologio, veterinara arto
- Ornitologio

Gerda Malaperis *www.mallonge.net/gerda-fr*

Claude Labetaa kreis retpaĝon en kiu la sonregistrita versio de Gerda Malaperis, instrua romano de Claude Piron, estas akompanata de (kaŝeblaj) esperantlingvaj franclingvaj tekstoj.

Ergane *www.mallonge.net/ergane*

Dictionnaire Espéranto-Français (Ergane): vortaro konstruita el la datumoj de la multlingva vortaro Ergane kiu entenas pli ol 9000 vortojn.

Freelang *www.mallonge.net/freelang*

La Freelang-vortaro (por Vindozo aŭ Android) permesas foliumi la esperantajn-francajn kaj Esperanto-francajn listojn. Vi povas serĉi vorton, aldoni proprajn tradukojn, redakti aŭ forigi ekzistantajn enskribojn, kaj lerni vortprovizon el personaj lernolistoj. La vortlistojn kreis Bernard Vivier. Li laste ĝisdatigis ilin en 2014.

Lexique et dictionnaire médical français-espéranto *www.mallonge.net/medical*

Ĉi tiu retejo proponas unuflanke leksikon por ricevo kaj medicina pridemandado de fremda paciento en Esperanto, aliflanke vortaro pri la terminoj de medicino en Esperanto. Ĝiaj kreintoj esperas helpi montri, ke la kvalitoj de Esperanto ankaŭ igas ĝin la plej bona elekto por profesia uzo, eĉ se la angla nuntempe havas preskaŭ monopolan pozicion en scienco. Esperanto estas aparte adaptita al la medicina kampo, kie la vortotrezoro estas kiel eble plej proksime al etimologio jam konata de kuracistoj, sed sen la proprecoj de la ortografio aŭ de la gramatikaj esceptoj de la angla, franca kaj plej multaj lingvoj.



Metodo 11 *https://metodo11.esperanto-france.org*

Tiu-ĉi metodo ellaborita por neprofesiaj instruantoj ankaŭ plaĉos al la aliaj pro ĝia moderna efikeco. Metodo 11 limigis sian vorto-trezoron je proksimume 500 radikoj, ĉar seriozaj statistikoj montris, ke neniu uzas pli multajn en ordinaraj konversacioj. Metodo 11 rezultas el la laboro de pluraj profesoroj pri fremdaj lingvoj. En la retejo elŝuteblas la unua leciono, sonregistraĵoj, korektoj de ekzercoj kaj gvidilo por instruistoj. La enhavo de la tuta verko estas nur havebla kiel libro.

Multidic *www.mallonge.net/multidic*

Multidika estas ĝenerala vortaro franca-Esperanto de Christian Bertin kun pli ol 50 000 vortoj. La apo por Android estas elŝutebla de *www.mallonge.net/multidic-apo*

Ĉar Multidic ankoraŭ ne estas havebla en Google Play, vi devas permesi Android-instaladon de aliaj fontoj. Dum instalado, vi devos permesi al Multidic aliri interreton serĉi tradukadon de vortoj en la servilo-stokita vortaro. Multidic ne havos aliron al viaj personaj datumoj (kontaktoj ktp).

Plej oftaj vortoj Esperanto - franca *www.mallonge.net/oftaj-franca*

Leksiko Espéranto-Français de Yves Bellefeuille kun la 552 plej oftaj Esperantaj vortoj.

Teknika vortareto de Greziljono *www.gresillon.org/teknikavortaro*

La plejmulto el niaj vortaroj limiĝas al kutimaj vortoj kaj la teknikaj terminoj estas malfacile troveblaj. Kiel traduki la francajn vortojn *une clavette parallèle, une panne sablière, une tarière aŭ une pince multiprise*? Per la vorto borilo kiel distingi inter *une perceuse, une chignole, une mèche, une vrille* aŭ *un poinçon*? Ĉu la vorto stuko signifas *un enduit de plâtre, un crépis, du staff, du stuc* aŭ *un badigeon?*

Laborante kiel volontuloj en Greziljono, oni konstatis ne koni ĉiujn vortojn, nek trovis ilin en vortaro. Tiel kreiĝis la unua listo en Esperanto de iloj. Tiu listo, afiŝita sur la pordo de la eksa ĉevalejo de la kastelo, ampleksiĝis kaj fariĝis teknika vortaro kun koloraj bildoj. Hodiaŭ ĉi tiu bilda vortaro ebligas la tradukon de pli ol 3200 vortoj aŭ teknikaj esprimoj utilaj por fabriki, konstrui, ripari kaj ĝardeni.

Ĝi estas senpage elŝutebla kiel PDF-dosiero: *www.mallonge.net/teknika-vortaro*

Vortaroj por parolantoj de la germana

Deutsch-Esperanto-Finder *https://def.fontoj.net*

De somero 2018 ekzistas nova germana-Esperanta vortaro en TTT. Respondecas pri la vortaro Albrecht Kronenberger. Li bazis sin sur la vortaro de Thomas Schütz kaj aldonis multe da materialo, interalie proverbojn, la nomojn de la konstelacioj kaj de multaj plantoj kaj bestoj, la enhavon de Kleines Wörterbuch de Ulrich Matthias kaj Dietrich Weidmann kaj aliaj. La vortaro nun ampleksas pli ol 93 000 kapvortojn.

DICT.CC *www.mallonge.net/dict-de*

Germana-esperanta vortaro al kiu vi povas ankaŭ mem kontribui.

Lingolia *https://esperanto.lingolia.com/de*

Ĉi tiu referenca libro por Esperanto klarigas gramatikon kaj vortfaradon en komprenebla maniero. Ĝi taŭgas por komencantoj kaj progresantoj. La gramatikaj reguloj estas klare strukturitaj kaj havas ilustritajn ekzemplojn, kiuj helpas videbligi la regulojn.

La Esperantocentro de Herzberg am Harz kunlaboris kun Lingolia por plibonigi la kurson. Ekzistas ankaŭ germanlingva Lingolia-poŝlibro **Esperanto – einfach, kompakt und übersichtlich**. Ĝin eblas mendi per *www.lingolia.com/de/buecher/esperanto*

LVortaro www.thschuetz.de/esperanto

Thomas Schütz kreis malfermitkodan vortaron kiu funkcias per Vindozo, Linukso kaj Makintoŝo. Ankaŭ ekzistas reta versio. Ĝi enhavas 59 000 kapvortojn en la parto DE-EO kaj pli ol 43 000 kapvortojn en la parto EO-DE.

Vortaroj por parolantoj de la hispana

Gran Diccionario Español-Esperanto *www.mallonge.net/diccionario*

Gran Diccionario Español-Esperanto estas dulingva vortaro kun preskaŭ 51 000 kapvortoj sur 1279 paĝoj, kompilita de Fernando de Diego. Ĝi enhavas multajn ekzemplojn de vortuzo en hispanaj frazoj kaj idiotismoj kun iliaj korespondaj esperantlingvaj ekvivalentoj. La vortaro estas libere konsultebla en interreto.

Vortaroj por parolantoj de la hungara

Eszperantó-magyar szótár *www.mallonge.net/hungara*

Kompilis Horváth József. 536 paĝoj. 3a korektita eldono aperis en 2015. La PDF-dosiero estas libere elŝutebla.

Eszperantó-magyar online szótár *www.eszperanto-szotar.hu*

Esperanta-Hungara-Esperanta interreta vortaro kaj tradukhelpa programo prizorgata de Szilvási László. Ĝi tradukas kaj analizas tekstojn ĝis maksimume 500 karaktroj.

Vortaro por parolantoj de la islanda

Esperanto-íslensk orðabók *www.mallonge.net/islanda*

En la landa kongreso de la Islanda Esperanto-Asocio (IEA) en la jaro 1989, Hugh Martin, honora gasto de la kongreso, donacis al la asocio sian manuskripton pri Esperanto-islanda vortaro kun ciuj rajtoj. La verkisto estis bazinta sian verkon sur la vortprovizo de la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV), eld. 1987, kaj klopodis registri islandajn tradukaĵojn de kiel eble plej granda parto de tiu vortprovizo.

Ĉiujn rebonigojn kaj preparadon por eldono de la vortaro islandaj esperantistoj faris kiel volontuloj. Komisio pri la vortaro, kiu estis starigita en la landa kongreso de IEA en la jaro 1991, organizis kaj prizorgadis la laboron pri eldono de la vortaro. Ekde la starigo de la komisiono la komisianoj estis Baldur Ragnarsson, Eysteinn Sigurðsson kaj Stefán Briem.

Vortaro por parolantoj de la itala

Vocabolario italiano-esperanto *www.mallonge.net/hvortaro*

Carlo Minnaja. Milano, 1996. 1438 paĝoj, 22 cm. Probable la plej granda nacilingva-Esperanta vortaro. Tre detala distingo de signifoj, multnombraj esprimoj kaj sintagmoj. Ekde januaro 2010, danke al la dispono de la esperantista informadikisto Danio Manetta kaj al konsento de Itala Esperanto-Federacio (kiu senpage donacis sian kopirajton), haveblas komputila programo kiu enhavas la tutan radikaron de la Vocabolario italiano-esperanto de Carlo Minnaja (1996), konstante korektata kaj ĝisdatigata de pria laborgrupo. La programo estis nomita hVortaro (hipervortaro), kaj elŝuteblas senpage.

Vortaroj por parolantoj de la japana

Praktika Esperanto-Japana vortaro *www.vastalto.com/pejv*

Interreta vortaro Esperanto-japana. Ĝin kompilis Hirotaka Masaaki. La vortareto estas la posteulo de "Elektronika Baza Vortaro Esperanto-Japana", kiu aperis en la jaro 1996 kun ĉirkaŭ 4700 kapvortoj. Ĝis laste ĝisdatiĝis en 2017 kaj enhavas ĉirkaŭ 44 100 kapvortojn. La eldonanto en antaŭparolo esprimas la planon, ke ĝi kresku ĝis la amplekso de ĉirkaŭ 50 000 kapvortoj.

Vortaroj kaj kursoj por parolantoj de la nederlanda

Esperanto zo op zak *www.mallonge.net/zoopzak*

Ĉi tiu 24-paĝa kolora broŝuro estas destinita al ĉiuj, kiuj deziras lerni Esperanton. En 8 lecionoj kun korektitaj ekzercoj, vi lernos la bazojn de Esperanto kaj rapide povos komuniki kun Esperanto-parolantoj el la tuta mondo.

Ĉi tiu broŝuro estas reeldono de PackEo, kiun reis Henrri-Sebastien Erhard. La ilustraĵojn desegnis Anna Striganova.

Majstro *www.majstro.com*

Majstro estas Esperanta multlingva tradukvortaro, kreita de la nederlandano Gerard van Wilgen. Ĝi donas eblon serĉi tradukojn de vortoj en 50 lingvoj. Ĉar ĝin kreis nederlandano, la nederlanda lingvo en la Majstro-vortaro estas tre bone ellaborita: aperas en ĝi 87 275 vortoj en la nederlanda kaj 70 761 vortoj en Esperanto.

Minicursusje *www.mallonge.net/mini*

La Flandra Esperanto-Ligo disponigas al interesitoj mallongan retan kurson. Je la fino eblas lasi interalie siajn nomon kaj retpoŝtadreson. Tiuj kiuj kompletigas la kurseton, ricevas senpage du paperajn ekzemplerojn de la revuo Horizon.Taal.

Pingveno *www.pingveno.nl*

Baza Esperantokurso kaj Esperantoŝlosilo, konciza gramatiko kaj vortareto.

Vortaroj kaj kursoj por parolantoj de la pola

Esperanta-Pola vortaro de Jerzy Wałaszek *www.mallonge.net/slownik*

Vortaro de Jerzy Wałaszek; tria eldono. Ne estas tipa vortaro, ĉar krom traduki unuopajn vortojn, ĝi enhavas dekojn da miloj da diversaj frazoj kaj kunlokigoj. Tio igas ĝin bonega fonto de scio pri Esperanto.

Kurs Esperanto *www.mallonge.net/kurso-pola*

Reta versio de Esperanto-lernolibro verkita de la forpasinta profesoro Mieczysław Sygnarski, lektoro de la Jagiellonian Universitato. La lernolibro estis eldonita en 1958, sed la versio en la retejo estas ĝisdatigita kaj aldoniĝis multaj ekzercoj kaj tekstoj.

Vortaroj por parolantoj de la slovena

Slovena-Esperanta vortaro *www.termania.net*

Post unu jaro da provuzado la eĥoj de uzantoj de la Slovena-Esperanta reta vortaro estas favoraj. La vortaro superis kvardek tri mil gvidvortojn. Oni povas rekte rete komenti kaj proponi ŝanĝojn aŭ aldonojn.

La Slovena Esperanta Vortaro Musoj Petrič estis eldonita en libro-formo en 1963 en Ljubljano. La aŭtoro komencis kompili ĝin en 1954, kaj plu okupiĝis pri ĝi ĝis sia morto en 1985. La hereda tipografio de la vortaro sur 1943 paĝoj estis transdonita al la Asocio por Esperanto de Slovenio. Iniciatis bitigon de la vortaro en 2016 Janez Jug. La Esperanto-Societo de Ljubljano decidis en 2017 kovri la kostojn de bitigo kaj publikigado ĉe Termanio. La vortaro ankoraŭ ne plene harmonias kun slovena ortografio 2001, ĉar la kompilado uzis literumon de 1962.

Ĉi tiu reta kreskanta slovena Esperanta Vortaro estas reaspektigita, reviziita kaj ĝisdatigita. Post publikigado, la vortaro estas konstante ĝisdatigita. Detaloj pri la vortaro aperas en *www.mallonge.net/slovar* (en la slovena)

Vortaroj por parolantoj de la turka


Turka-Esperanta vortaro *www.tr-vortaro.info*

Ege Madra en 2018 realigis novan kaj modernan vortaron. La enhavo de la vortaro estas simpla, sed oni povas taksi ĝin kiel la plej ampleksa vortaro turka-Esperanta kreita ĝis nun. La amplekso de la vortaro estas limigita, sed ĝi provizas la eblon esti plibonigita. La vortaro nun enhavas ĉirkaŭ 6000 vortojn.

Tre praktika estas la legasistanto en la retejo. Ĝi ebligas vin facile atingi tradukojn de Esperantaj vortoj kiujn vi alŝutas.

Literumiloj kaj aliaj iloj

Lingvoilo *www.languagetool.org/eo*



Laŭ miaj esploroj, la plej bona nuntempa literuma kaj gramatika kontrolilo estas Lingvoilo, esperantlingva versio de la internacia projekto LanguageTool.

Lingvoilo estas libera, plurlingva kontrolilo por OpenOffice/LibreOffice. Ĝi funkcias ankaŭ per algluado de teksto en la retejo de la projekto. Cetere ekzistas Firefox-kromprogramo.

Tujtradukilo de Verkoj.com *www.verkoj.com*

Multaj verkistoj kontribuis kaj konstante kontribuas al la Esperanta kulturo. Ili ne agas pro ekonomiaj konsideroj, sed male: kreado en Esperanto postulas, ke ili investu multe da tempo kaj rimedoj, kelkfoje eĉ fronte al indiferenta kaj nekomprenema ĉirkaŭaĵo. Ili agas nur pro la amo al la literaturo kaj al la lingvo, kaj sentas, ke ili plenumas gravegan taskon.

Oni povas konsideri ilin naivuloj kaj nerealaj homoj, sed dum la tempopaso ili donacis al Esperanto veran, neatenditan trezoron – originalajn kaj riĉajn literaturon kaj poezion, kiuj havas memstaran valoron per si mem en la monda kulturo. La retejo estas *Verkoj.com* estas dediĉita al ili. Ĝia celo estas igi iliajn verkojn alireblaj al la vasta publiko.

Tre utila estas la tuj-tradukilo en tiu ĉi! Simple elektu kaj kopiu vorton (per Ctrl+c, ekzemple), kaj la traduko tuj aperos. Provu ĝin eĉ en tiu ĉi paĝo! Se traduko ne troveblas, oni povas redakti la vorton kaj serĉi denove. Ĉiam aperas Esperanta difino, kune kun traduko al nacia lingvo. Eblas tiel tujtraduki al 15 lingvoj!
www.verkoj.com/tradukilo

Unikoda konvertilo *www.komputeko.net/konvertilo.php*

Ekzistas pluraj surogataj skribosistemoj por Esperanto. La H-sistemo estas laŭ-fundamenta ortografia varianto kaj la X-sistemo oportunas por enigi tekston kaj por interna komputada datumprilaboro.

Por konverti tekstojn inter diversaj sistemoj, tajpu aŭ algluu ĝin en la kadron en la retpaĝo kaj alklaku la taŭgan butonon.



La fundamento *www.mallonge.net/fundamento*


Oni povas facile trovi la retan eldonon de Fundamento de Esperanto, kiun skribis Ludoviko Zamenhof en 1905. Jerzy Wałaszek enretigis ĝin nur por ke ĝi pli disvastiĝu.

Ĉapelitaj literoj

Vindozo *www.mallonge.net/tajpi-eo*

En la Esperanta alfabeto ekzistas ses diakritaj literoj, kiujn vi ne povas tajpi per regulaj klavaraj aranĝoj (ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ).

Por Vindozo versioj 7, 8 kaj 10 mi rekomendas la programeton **Tajpi** de Thomas James. Tajpi estas programo, kiu ebligas al vi tajpi ĉapelitajn literojn kun facileco kaj sen modifi vian sistemon.



Makintoŝo *www.mallonge.net/mak*

Mi esploris multajn manierojn tajpi ĉapelitajn literojn sur Mac OS X. La plej facila kaj konvena solvo laŭ mi estas instali klavararanĝon. Mi disponigas en la Komputeko-retejo solvon por "universala" QWERTY-klavaro kaj por belga kaj franca AZERTY-klavaroj.

Linukso *www.mallonge.net/linukso*


Por bone uzi Esperanton en Linukso, necesas iom da agordado de la sistemo. Ekzemple necesas, ke la sistemo uzu unikodan lokaĵaron. Pluraj Linuksaj distribuoj (precipe tiaj, kiuj baziĝas sur "Debian", ekz. "Ubuntu" kaj "Kubuntu") nuntempe jam enhavas pretan Esperantan klavararanĝon. Se vi instalis ĉiujn bezonatajn pakaĵojn por Esperanta lingvosubteno, tiam tiu klavararanĝo jam devas esti elektebla. En la retejo de Bertilo Wennergren vi trovos detalajn informojn pri pluraj distribuoj de Linukso.

Poŝtelefonoj Android kaj iOS *www.mallonge.net/sk-android kaj www.mallonge.net/sk-ios*

Mi mem uzas kaj rekomendas **SwiftKey**. Subteno por Esperanto ekzistas ekde 2016 por Android kaj 2017 por iOS kaj uzantoj pri ĝi entuziasmas. Estas pluraj klaraj avantaĝoj:

- Ĝi funkcias per la plurlingva eniga sistemo de Swiftkey. Ne plu necesas ŝalti inter pluraj klavararanĝoj.

- Ĝi sugestas vortojn por povi pli rapide tajpi. Se ekzemple vi tajpas "cirkau", per tuŝeto vi povas ŝanĝi tion al "ĉirkaŭ".
- Ĝi enhavas logikajn vortkombinojn. Se ekzemple vi tajpas "mi ne", aŭtomate SwiftKey sugestas la vortetojn "estas", "scias" kaj "povas". Tio ege plirapidigas la tajpadon!



Ĉi tiel agordu SwiftKey por iOS:

- Nur uzu ĝin por Esperanto, eĉ se teorie eblas instali duan lingvon. Instalu aliajn klavarojn per la operaciuma sistemo.
- Ne montru la linion kun nombroj ĉe la klavaro. Se ne, la klavaron uzas tro da spaco sur la ekrano dum vi uzas ĝin.

Por Android ekzistas pluraj alternativaj klavaroj. La plej uzata estas verŝajne **Gboard** de Google. La diferenco kun SwiftKey estas ke vi devas ĉiufoje ŝalti inter anglaj kaj Esperantaj klavararanĝoj (per tuŝado de malgranda globobild-simbolo). La Esperanto-klavararanĝo donas al vi apartajn signoj kaj nur donas antaŭdirojn por Esperantaj vortoj - la angla klavararanĝo nur anglajn antaŭdirojn. Evidente, ĉio dependas de via prefero. *www.mallonge.net/gboard*

Retaj ludoj

Claude Labetaa de la Perigorda Esperantista Grupo kreis diversajn retajn ludojn:

- krucvortenigmoj
- pendumito-ludoj

Vi povos per ili agrable kaj amuziĝante plivastigi vian vorto-provizon.

www.mallonge.net/eo-ludoj



Oftaj prikomputilaj vortoj

Angla	**Esperanto**	**Franca**
account (data)	konto	compte
address book	adresaro	carnet d'adresses
administrator	administranto	administrateur
align	ĝisrandigi	aligner
all-in-one	ĉio-en-unu	tout-en-un
allow	permesi	permettre
always on top	ĉiamvidebligi	toujours visible
anonymous	sennoma	anonyme
antivirus software	senvirusigilo	programme anti-virus
application / app	aplikaĵo / apo	application / appli
arrow key	sagoklavo	touche fléchée
at sign	heliko	arobase
attachment	kunsendaĵo	pièce jointe
auto-complete	aŭtomate kompletigi	auto-compléter
back-office	administrejo	arrière-guichet
backslash	malsuprenstreko	barre oblique inverse
backspace	retropaŝo	retour arrière
backup	savkopio	sauvegarde
bandwidth	kapacito	bande passante
banner	reklamrubando	bannière
beta release	beta-eldono	version bêta
blog	blogo	blog
bookmark	legosigno	signet
broadband connection	larĝkapacita konekto	connexion haut débit
browser	retumilo	navigateur web
bug	cimo	bogue
calendar	kalendaro	calendrier
caps lock	majuskla baskulo	verr. maj
case sensitive	usklecodistinga	sensible à la casse
center	centrigi	centrer
charge (batteries)	ŝargi	charger
charge (load)	ŝarĝi	charger

chart	diagramo	grafique
column break	kolumnosalto	saut de colonne
comma-delimited file	diskoma dosiero	fichier CSV
compatible	kongrua	compatible
compiler	kompililo	compilateur
computer	komputilo	ordinateur
computer case	komputilujo	boîtier
conditional formatting	kondiĉa aranĝo	mise en forme conditionnelle
configure	agordi	configurer
content	enhavo	contenu
copy and paste	kopii kaj alglui	copier-coller
crash (computer)	kraŝi	se planter
cut and paste	eltondi kaj alglui	couper-coller
database	datumbazo	base de données
deactivate	malaktivigi	désactiver
deadline	limdato	date limite
debug	sencimigi	déboguer
deleted items folder	rubujo	dossier Éléments supprimés
developer	programisto	programmeur
disable (login)	malvalidigi	désactiver
disclaimer	malgarantio	clause d'exclusion de responsabilité
dots per inch	punktoj en colo	points par pouce
download	elŝuti	télécharger
drop-down list	fallisto	liste déroulante
e-banking	retbankumado	banque électronique
e-book	bitlibro	livre numérique
editor (program)	redaktilo	éditeur
e-learning	retlernado	apprentissage en ligne
e-mail (general)	retpoŝto	courriel
e-mail (message)	retmesaĝo	message (électonique)
e-mail client	retpoŝtilo	logiciel de messagerie
enter key	eniga klavo	touche entrée
exit key (Esc)	elira klavo	touche échap
file	dosiero	fichier

frequently asked questions	oftaj demandoj	foire aux questions
full-screen	tutekrana	plein écran
hacker	kodumulo	hacker
hardware	aparataro	matériel informatique
hyperlink	ligilo	lien hypertexte
installer	instalilo	logiciel d'installation
instant messenger	tujmesaĝilo	messagerie instantanée
internet access provider	provizanto de retkonekto	fournisseur d'accès
keyboard	klavaro	clavier
laptop	tekokomputilo	ordinateur portable
licence	permesilo	licence
log in	ensaluti	se connecter
log out	elsaluti	se déconnecter
mailing list	dissendolisto	liste de diffusion
multitasking	plurtaskado	multitâche
operating system	operaciumo	système d'exploitation
password	pasvorto	mot de passe
pop-up window	ŝprucfenestro	fenêtre intruse
print version	presebla versio	version imprimable
remote control	teleregilo	télécommande
save (data)	konservi	enregistrer
server	servilo	serveur
setup program	agordilo	logiciel de configuration
smartphone	saĝtelefono / aptelefono	smartphone
software	programaro	logiciel
spelling checker	literumilo	correcteur d'orthographe
tablet computer	tabulkomputilo / platkomputilo	tablette tactile
touchscreen	tuŝekrano	écran tactile
typeface	tiparo	police d'écriture
uninstall	malinstali	désinstaller
upload	alŝuti	transmettre (un fichier)
USB stick	poŝmemorilo	clé USB

Pli da prikomputilaj vortoj vi trovos en la retejo **www.komputeko.net**



Esperanto tiesioginiu metodu
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **litova** tradukis Indrė Pileckienė. Martin: La aŭtoro, 2008. 114p. 25cm. ISBN 9788089312085. € 7,50.



Esperanto bằng phương pháp trực tiếp
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **vjetnama** tradukis Lê Thị ThiênThu. Martin: la aŭtoro, 2008. 114p. 25cm. ISBN 9788089312092. € 7,50.



Esperanto mat der direkter Method
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **luksemburga** trad. B. Fuchs, P. Karger, Ch. Kerger, T. Theis, A. Wickler. Martin: 2009. 114p. 25cm. ISBN 9788089312122. € 7,50.



Eszperantó egyenesen és közvetlenül
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **hungara** tradukis Imré Szabó. Martin: 2009. 114p. 25cm. ISBN 97880893120106. € 7,50.



Esperanto izravna metoda
S. Marček. Ilustris L. Marčeková. Al la **kroata** tradukis Marija Jelković. Zagreb, 2009: Udruga Zagrebačkich Esperantista. 114 p. 25cm. ISBN 9789535541806. € 7,50.



Esperanto mutkattomasti
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **finna** tradukis Tuomo Grundström. Martin, 2009. 114p. 25cm. ISBN 9788089312146. € 7,50.



Esperanto přímou metodou
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **čeĥa t**radukis Max Kašparů. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2010. 112p. 25cm. ISBN 9788087169186. € 7,50.



El Esperanto por el método directo
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **hispana** tradukis Augusto Casquero. Martin: La aŭtoro, 2010. 114p. 25cm. ISBN 9788089312085. € 7,50.



Esperanto prjamim metodom
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **ukraina** tradukis Mikaelo. Lineckij. Kijiv: M. Lineckij, 2011. 114p. 25cm. ISBN 9789662390025. € 7,50.



Esperanto direkt
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **sveda** tradukis K.-G. Gustafsson. Martin: La aŭtoro, 2011. 114p. 25cm. ISBN 9789185288373. € 7,50.



世界語直接學習法
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **tajvana** (malnovĉina) tradukis 莊迎華. Pingdong: 2011 M. Reza Kheirkhah, 2011. 114p. 25cm. ISBN 9788089312214. € 7,50.



ԷՍՊԵՐԱՆՏՈ ուսուցում՝ ուղիղ մեթոդով
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **armena** tradukis Karine Arakeljan. Erevan: Karine Arakeljan, 2011. 114p. 25cm. ISBN 9788089312207. € 7,50.



เอสเปรันโต โดยวิธีตรง
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **taja** tradukis M. Starrs k.a. Martin: La aŭtoro, 2012. 114p. 25cm. ISBN 9788089312214 . € 7,50.



Esperanto den direkte metoden
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **norvega** tradukis Bjørn K. Øyen. Martin: La aŭtoro, 2011. 114p. 25cm. ISBN 9788089312245. € 7,50.



Esperanto dengan metode langsung
Stano Marček. Ilustris Linda Marček. Al la **indonezia** tradukis Asfrina Liola, Eko Nur Syah Hidayat, Abdul Haris Adnan, Ilia Dewi. Martin, 2013. ISBN 9788089312269. € 7,50.



Esperanto með beinni aðferð
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **islanda** tradukis L. þorsteinsdóttir kaj H. Sæmundsson. Martin, 2013.114p. 25cm. ISBN 9788089312252. € 7,50.



Doğrudan Metod ile Esperanto
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **turka** tradukis Vasil Kadifeli. Martin, 2014. 114p. 25cm. ISBN 9788089312313. € 7,50.



एस्पेरांतो सीधी पद्धती से|
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **hinda** tradukis Aniruddha Banahatti. Martin, 2015.114p. 25cm, ISBN 9789535541806. € 7,50.



Есперанто Директен метод за изучаване
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la bulgara tradukis Mariana Genčeva. Martin: La aŭtoro, 2016. 114p. 25cm. ISBN 9788089312337. € 7,50.



Esperantica directo
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **latina** tradukis Bernhard Schwaiger. Martin: La aŭtoro, 2016. 114p. 25cm. ISBN 9788089312320. € 7,50.



Esperanto الإسبرانتو بالطريقة المباشرة
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **araba** tradukis H. Hussein. Martin: La aŭtoro, 2017. 114p. 25cm. ISBN 9788089312344. € 7,50.



Esperanto ar tiešo metodi
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Al la **latva** tradukis A. Bušs, A. Kalniņš, B. Rozenfelde. Martin: La aŭtoro, 2017. 114p. 25cm. ISBN 9788089312351. € 7,50.

Mendu ĉe: Stano Marček Zvolenská 15, SK-036 01 Martin, Slovakio. 🖳 ***stano.marcek@gmail.com***

Ĉio estas trovebla en interreto! Sed... multaj retejoj prezentas malaktualajn informojn kaj ne plu uzeblajn versiojn de programoj. Trovi la indaĵojn estas temporabe kaj foje iom komplike.

Dum prelegserio pri komputilaĵoj kaj retaj projektoj en lokaj kluboj en Benelukso mi rimarkis ke tre mankas superrigardo de tiaj indaj (kaj aktivaj) projektoj. Post prezento mi foje per retpoŝto sendis la plej interesajn ligilojn al ĉeestintoj, sed tio klare ne sufiĉas. Papera verko kun tekstaj klarigoj daŭre plej taŭgas por tiu celo. Do mi ek-kreis tion.

Ĉi tiu unua volumo de *Eksterrete* donas superrigardon de kaj klarigojn pri indaj kaj ĝisdataj projektoj rilate lerniloj kaj vortaroj. Ĝi enhavas ankaŭ klarigojn pri ĉapelitaj literoj kaj vortareton de oftaj prikomputilaj vortoj.

www.komputeko.net/eksterrete

LiberaPay

La fonduso Instigo-Liberapay, sub la aŭspicio de UEA, subtenas Esperanto-agadojn, kiuj celas provizi retajn servojn en Esperanto. Kiel komisiito de UEA pri reta agado, mi gvidas la laborojn.

Mi invitas vin subteni la kreadon, eldonadon kaj disvastigon de Eksterrete-libretoj per donaco al Instigo-Liberapay.

https://eo.liberapay.com/instigo